

**AVENO # 42 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj**  
**Januaro - Decembro 2016**

Jen gheeneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj kaj diversaj peticio-petoj, aliaj trovighas je Ekologio & Homaj Rajtoj

La kotizo por AVE estas libervole paginda - proponite: 5 EUR jare, pli au malpli eblas.

Nia UEA-Konto: avex-z; Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A  
Noto: (de "via nomo" por Kto. avex-z)

Elkoran dankon - Manfred Westermayer, la sekretario.  
Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Br., Germanio  
Retejo de AVE: <http://www.verduloj.org>  
Nia interreta diskutejo trovighas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

Koncize:

1984 - 2014 AVE kunvenis por festi la 30-jarighon:

Ni tradukis la Manifestojn 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur [www.verduloj.org](http://www.verduloj.org))  
- Federacio de Junaj Europaj Verduloj  
- Europa Verda Partio

Datumbazo de Esperanto-parolantaj organizajhoj - kaj Maklerejo: <http://per.esocom.de>

La projekto <http://www.lingvo.info> celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto ...

La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

Internaciaj Ago-Tagoj (nur kelkaj)

01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)

02-21 : Internacia Tago de la Patrino Lingvo

03-08 : Internacia Tago por Virinoj

03-10 : Internacia Tago por la Autonomio de Tibeto

03-21 : Tago de la Mondcivitanoj

03-22 : Internacia Tago por la Akvo

04-20 : Tago de la Tero

05-09 : Europa-Tago

05-15 : Nakba-memortago pri la forpelado de araboj el la nov-fondita shtato Israelo (1948)

05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo

06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj

....

**=== Detale lau la dato ===**

2017-07-20/08-12 Biciklado kontraŭ atomenergio kaj tele-milito en Svisio kaj Germanio:  
La ekologiisma biciklado "tour de natur" sekvontsomere iros de Bazelo al Mannheim kaj Ramstein, de kie Usono gvidas la spavoj (tele-stirataj aviadiloj) kiuj fotas kaj pafas en la orientaj regionoj.

Bele estus se partoprenus pluraj esp-istoj.

Informoj haveblas je <http://www.tourdenatur.net>

Dankon al Ronaldo N

--

2017 AVE-anoj subtenas la konstruon de gastejo por knabinoj en Marambeka  
Pluraj samideanoj en Europo, inter ili de AVE, ek-financis kaj subtenadas la mezlernejon Esperanto Secondary School en Marambeka, Tanzanio; unu el la Mazingira-projektoj de Mramba Simba.

Unu el la urghaj bezonoj estas gastejo (tranoktejo) por lernantinoj kiuj loghas en granda distanco de la lernejo, ĉar pluraj el ili survoje estis sekse perfortitaj kaj gravedighis; kaj pro tio devas fini la lernadon. Tial la lernantinoj petis konstrui tranoktejon. La vilagharo pagos la

laboron, sed ne havas monon (ch. 6.000 Euroj) por konstru-materialo - kaj krome necesos (simplaj) mebloj.

Ni petis subtenon de fonduso de firmao Bosch, krome AVE kontribuos almenau per 1000 Euroj.

Ni ankoraŭ ne scias, ĉu Bosch akceptos. La konstruo devus komenci plej baldaŭ.

Se vi povas - bonvolu transpigi al la UEA-konto de AVE: avex-z

En Germanio ni kolektas sur la konto de „Stiftung Bruecke“, Internet: [www.Stiftung-bruecke.de](http://www.Stiftung-bruecke.de)

Bank f. Sozialwirtschaft, IBAN: DE12100205000003247404, BIC: BFSWDE33BER

--

2016-11-19 subteni Esperanto-lernantajn junulojn en Goma, Nord-Kivu, D.R. Kongo  
Alphonse WASEKA, kiu organize subtenas la projektojn de AVE „Akvo por Kalima“, organizas subtenadon por orfoj au malrichaj geknaboj kaj gejunuloj, ke ili povu pagi la lernejon kaj studadon. La lernantoj havas diversajn religiojn: inter ili kristanaj, kaj bahaaj .

La retejo de Solidareco Bona Volo montras la infanojn kun informoj, kaj ankoraŭ rakontas pri la kruela historio de D.R. Kongo. Krome ĝi provizas plurajn film(et)ojn pri tio.

La retejo estas ankoraŭ en Esperanto, kaj je „Komenco“ vi trovos butonojn por trovi la diversajn sub-paghojn:

<http://solidarecobonavolo.weebly.com/kiel-helpi.html>

==

2016-10-31 sukcesa operacio de pluraj infanoj en Tanzanio

La infanoj kun misformitaj kiuj estis en hospitalo por operacioj tre bone resanighis kaj revenis al siaj gepatroj. Kelkaj venas el apudaj distriktoj. Mi esperas ke ni, AVE-anoj, povas subteni denove operaciojn – ni kolektas ĝhis fino de marto 2017.

La fotojn vi trovos tie: [www.verduloj.org/handikap.htm](http://www.verduloj.org/handikap.htm)

----

2016-11-03 Monda solidareco kontraŭ la Malsato, Globidar.org en nova retejo

Sekve de la mesaĝo de Manfred, mi informas vin, ke Monda Solidareco kontraŭ la Malsato - ankaŭ konata kiel “Globidar” (glob-id-ar) - elektis Esperanton kiel oficialan lingvon. La propra retejo

[www.globidar.org](http://www.globidar.org) ekhavas novan aspekton sed nur en franca lingvo. La esperantlingva fako de

MSM-Globidar plu restas atingebla en la retejo de la Civitanoj de la Mondo :

<http://www.recim.org/globe/solidareco.htm>

Tamen mi atentigu vin, ke MSM-Globidar estas mutuala asocio ; tio estas tre bona punkto laŭ filozofia vidpunkto, sed malrapidigas eventualan financadon de projekto, ĉar la projekto devas esti konforma al la mutualismaj reguloj, striktaj. Do, ne donacas, sed kreditas (se mi bone komprenis)

Kvankam Esperanto estas la oficiala lingvo, neniel iu grupo ricevas avantaĝon pro uzo de Esperanto. Solidarece, “globidare”, via, [Daniel Durand](http://www.recim.org/globe/solidareco.htm)

Jen la ligilo en multaj lingvoj: <http://www.recim.org/globe/index.htm>

==

2016-10-20 Kotizo por AVE

Se AVE fakte partoprenus la kongreson de Global Greens 2017 (de la Tutmondaj Verdaj Partioj) en Liverpool, ni intencis ke AVE pagu la kongres-kotizon por la partoprenantoj.

Ni volas montri ke Esperanto ekzistas, funkcias, kaj estus justa maniero reduktii la lingvan problemon de la Verdaj Partioj.

Tial mi petas vin, se vi ankoraŭ ne faris, pagi vian kotizon (minimуме 5 Euroj), kaj eble pagi jam por 2 jaroj.

Bonvolu kontribui per via donaco al la UEA-konto de AVE:

avex-z, komento "Kotizo 2016 & via nomo".

Se vi ne estas membro de UEA vi povas transpigi al la UEA-konto:

IBAN: NL72INGB0000378964 , BIC: INGBNL2A , Noto: ("Kto. Avex-z, de *via nomo*")

Anticipan dankon, Manfred

---

2016-10-20 Trinkakvo en Afriko / Raporto de Mazingira / 2017 denove por Kalima Dank' al 2 subtenantoj de AVE kaj al denova granda donaco de Wasserkraft Volk AG en Gutach ni povis subteni la projekton por pluvo-baseno en Nyaburundo per entute 6.400 Euroj.

Se la katolika pastro Hubert en Kalima sukcese ricevos donacon de fonduso de germana diocezo Freiburg por barajho je rivereto Abuki; nia „tasko“ estus en 2017 kolekti monon por la akvo-dukto ghis la urbo - minimume 10 mil Euroj. Tiam restus la pli granda tasko por la 130.000 civitanoj komune financi la distribu-sistemon en la urbo.  
Rememorinde: ni subtenis en 3 projektoj la distribuon da trink-akvo por ch. 10.000 homoj.  
La aktuala raporto de Mramba Simba pri la projektaro Mazingira en Tanzanio estas legebla sur nia retejo: [verduloj.org](http://verduloj.org)

2016-07 Dauripovon en la UEA-statuton:  
AVE delonge petis UEA-on aktualigi la statuton per la pricipo de dauripova evoluo.  
Kaj jen la vortumo por tiu amendo:

"La gvidprincipoj de Paco, Homaj Rajtoj kaj Daŭripova Evoluo, kiaj ili estas difinitaj de la UN (UNDP, UNEP), UNESCO kaj aliaj internacie rekonataj institucioj, estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj."

(Propono de Wolfgang Guenther )

==

2016-07-19 Pluvakvo-baseno por Nyaburundu ni tre ghojas, ke ni povas denove subteni projekton en Tanzanio je Mazingira Ketare/Salama, organizita de Mramba Simba.  
Temas pri baseno por kolekti pluvon, kiu servos por ghardenoj kaj la brutaro de Nyaburundu. Kiel jam menciite, ni ricevos 6 mil de germana firmao, kaj devus kolekti 1.500 Euroj por kovri la kostojn de la materialo, dum la man-laboro estos la kontribuo de la lokaj civitanoj.  
Bonvolu kontribui per via donaco al la UEA-konto de AVE: avex-z, komento "Pluvakvo-baseno, & via nomo".

Se vi ne estas membro de UEA vi povas transpigi al la UEA-konto:  
IBAN: NL72INGB0000378964 , BIC: INGBNL2A , Noto: ("pluv-akvo por Kto. avex-z")  
La transpago okazu komence de Septembro.

==

2016-07-02 pri Mazingira, Demokratio kaj vizio pri EU, BREXIT, EP-ano Sven Giegold intertempe ni sukcese subtenis la opercion de pluraj infanoj por kiu petis kaj agadas Mramba Simba enkadre de Mazingira Ketare, Tanzanio kaj mi dankegas al tiuj malmultaj kiuj denove kun-financis.  
Sed venonte mi ne plu anticipu promesos konkretan sumon flanke de AVE.

Kun granda ghojo mi ricevis pozitivan reagon de Wasserkraft Volk AG, kiu subtenos la konstruon de pluvakvo-baseno en la regiono de Ketare. Ni ricevos 6 mil Euro, kaj mi esperas ke ni kun-financos 1,5 mil. La surloka laboro estos la kontribuo de la lokaj civitanoj.

Pri la rezulto de la referendumo en Britio: mi ege miras, ke tia grava decido, kiel eliri el EU, okazus per simpla plimulto ?

Pluraj partoj de la socio ege kontrauas: la Skotoj, Nord-Irlandanoj kaj la Junuloj - ili preferas EU-on.

Ankau interese, ke el la chefaj incitantoj, Cameron kaj Johnson, neniu emas preni al si la respondecon fari la BREXIT.

Mi esperas, ke BREXIT ne okazos.\*

Kaj eble pozitiva rezulto estus, ke la EU ighos pli demokratia - almenau auskulti kaj pripensi la

proponojn de la naciaj parlamentoj, kaj de EU-aj Civitanaj Iniciativoj. Ne Juncker portos la problemojn el CETA, TTIP kaj plidaura uzo de Glifosat (totala herbicido/plantmurdigo), sed ni chiuj..

La verdpertia EU-Parlamentano, Sven Giegold, ege laboras pri tiaj temoj, kaj ekz-e postulas malferman liston de lobiistoj kiuj agadas en la EU. Ne temas pri malpermeso de lobiado, sed oni devas scii kiu laboras por kia intereso. Same gravas, ke decidoj pri la sano de homoj kaj naturo estu bazitaj sur neutralaj esploroj, kaj ne sur kashitaj de firmaoj. Same temas pri la impostofraudado flanke de internaciaj konzernoj. Jen vi povas mendi liajn regulajn informojn en 4 lingvoj: [sven-giegold.de](http://sven-giegold.de)

Ekz-e la lasta temis pri la malafabla verdikto kontraŭ la problem-fajfistoj rilate LUXLEAKS: en la germana kaj angla: <http://www.sven-giegold.de/2016/skandaloeses-urteil-gegen-luxleaks-whistleblower/>

Finfine - ni bezonas vivan vizion pri EU: paca kunvivado ene de kaj al la eksteraj landoj, komprenigo kaj komprenemo de politikaj decidoj, malaltaj limo-baroj por varoj kaj homoj, malpli da NATO/OTAN - tamen EU-propra limgardado ekz-e kontraŭ rusiaj prov(ok)oj.

Ne eblas nun detale kritiki la imperiisman agadon de P.R.Chinio pri la maraj teritorioj; au pri la stulta politiko malpermesi la pashto-migradon al bovo-bredantaj nomadoj en Interna Mongolio kaj Tibeto. Ili protektis la herbejon. Responde nun venadas polvo-ventoj.

\*) Pluraj AVE-anoj partoprenos en Liverpool **2017-03-30/04-02 Tutmonda Kongreso de la Verdaj Partioj**

[globalgreens.org](http://globalgreens.org) - kiel mi jam anoncis, tiu kongreso estos mia plejlasta agado kiel sekretario de AVE.

Bondezirojn al Vi, amike, manfred

Por anonci laborgrupon pri la lingvopolitiko mi esperas Vian partoprenon. Bonvolu respondi - chu JES / Probable / NE ?

--

2016-04-23 Mazingira: Operacii denove 6 kriplitajn infanojn en Tanzanio\*

Dank al pluraj AVE-anoj ni sukcesis sendi 600 Euroj al Mramba Simba por operacio de pliaj infanoj kun kriplitaj piedoj au gamboj. Ankau Christiane el Francio aldonis 200.

Mramba raportis:

Ni vojaĝhis al Dar es salaamo kun 6 infanoj kiujn lau mi devis estu operacitaj en la hospitalo CCBRT per tiu mono. La vojaĝho dauris 28 horojn per buso de Bunda urbo al Dar es salaamo.

Feliche kiam mi alvenis kun la infanoj en la hospitalo oni bonorde nin akceptis kaj tuj okazis la registrigho de infanoj por renkonti la kuracistojn. Mi povis pagi por la registrigho kaj por renkonti la kuraciston. Chiu infano rapide renkontis la kuraciston, kiu ekzamenighis ankau la sangon kaj ostojn (pere de X-ray/rentgeno).

Finfine la kuracisto ordonis ke ni iru al alia chambro por pagi la operaciojn kostojn de 5 infanoj, Temis pri GERTRUDA Mathias, BRAYTON S Twimo, CHAUSIKU Rubesa, JULIUS M Wangoko kaj MGAYA Wakara, kiujn devis estu operacotaj morgau la 22-a de Aprilo.

NEEMA GATI devos atendi ghis la 2-a de Majo al specialisto pri brakoj kaj muskoloj.

**Sed bedaurinde la operacioj kostoj de tiu hospitalo ege pli altighis ekde Aprilo kaj mi tute ne antaue sciis pri tio prez-altighoj.**

Do, per la mono kiun mi kunhavis de Christiane kaj AVE, mi nur povis pagi por operacioj de 3 infanoj, Getruda Matias, Julius Wangoko kaj CHAUSIKU Rubesa; 2 estas sub 5\* jaroj kaj unu de 6 jaragha. La restanta mono ne sufichas por la operacio-kosto de unu plia.

Mankas 1300 Euroj por BRAYTON kaj MGAYA; kaj ghis nun nekonata sumo por NEEMA.

Kompreneble la infanoj ploregas char ili ekpensas ke ili neniam ricevos operacion kaj restos kun

iliaj misformigho dum iliaj tuta vivo pro manko da mono.

Mi kunsendas la fakturon por tiuj 2 kaj petas konsili min pri kion mi faru.\*

Intertempe mi klopodis – sed sen sukceso - al redukto de la fakturo.

Do, mi petas helpi kaj peti plian subtenon **NUR POR TIUJ 2+1** infanoj, por ke ili estu operacotaj en la venonta semajno. Kaj promesas, ke estonte akceptos nur helpi al infanoj sub 5-jaraj.

Do per tiu raporto mi atendas viajn opiniojn/konsilojn. Se vi konsentas, mi povos per de la mono el MAZINGIRA konto pagi la operacio-kostojn por la 2 + 1 infanoj kaj poste ni povos repagi tion monon al la konto de MAZINGIRA per la mono kiun vi espereble povos kolekti.

Anticipe dankas, amike,

Mramba Simba (kaj la infanoj)

\*) Rimarko: la operacioj por infanoj sub 5 jaroj estas malpli kostaj (chefe la loghado, ktp.)

Kelkaj el tiuj infanoj venas el najbaraj vilaghoj, kiuj ne havas tian aktivulon kiel Mramba Simba, kiu kolektas monon dank' al Esperanto, kaj kiu pretas vojaĝi 28 horojn kun la infanoj al la hospitalo, kaj zorgas por ili. Feliche unu el liaj filinoj subtenas ilin en Dar-es-Salaam.

Fakte:

Por AVE kaj mi, mi respondis ke li prunteprenu la monon el la Mazingira-kaso, kaj ke mi/ni subtenos lin unue je fino de Junio per 650 Euroj. Ankoraŭ ne klaras kiom kostos la operacio de la brako kaj/au mano de Neema.

Christiane respondis ke ŝi rapide helpos, sed povas nur iomete

**Do, mi petas denove subteni la operaciojn.**

Se vi je la jarkomenco ne povis helpi, eble nun ?

Vi povas transpigi:

au al la konto de Mazingira je FEL (zorgita de Bart Demeyere)

au al la UEA-konto de AVE: avex-z

Ech se vi ne estas membro de UEA, vi povas transpigi al tiu konto:

IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A

Noto: (por Kto. Avex-z, de "via nomo" por operacio)

Komento AVE/mw: mi reduktis la leteron al la necesa informo. Vi povas rigardi la problemojn de tiaj infanoj sur nia retejo: [verduloj.org/Mz-handikapitaj.htm](http://verduloj.org/Mz-handikapitaj.htm)

==

2016-03 EU-Civitana-Iniciativo kontraŭ plastajhoj en la maro

Se vi loghas en EU-lando, bonvolu subteni tiun iniciativon (de, en, es, fr, it):

<https://ec.europa.eu/citizens-initiative/REQ-ECI-2015-000003/public/index.do?lang=de>

Jen pluraj dokumentoj en Esperanto sur nia retejo:

<http://verduloj.org/akvo.htm>

Ihre Unterstützungsbekundung ist eingegangen!

Bitte bewahren Sie die nachstehenden Referenzangaben für eventuelle Anfragen an die Organisatoren hinsichtlich Ihrer Unterstützungsbekundung.

Kennung: bfe377bb-b534-4e42-b160-5ecdd8949cab

Datum: 23/03/2016

==

2016 Kunvenoj de AVE

Ĉar ĉi-jare mi mem eble je neniu granda Esperanto-konferenco partoprenos, mi petas informi la sekretariojn (do, ankoraŭ min):

ĉu vi partoprenos: UK, IJK, SAT, GEK, Afrika ...,

kaj pretas partopreni kaj eble ankaŭ organizi AVE-kunsidon je ĉi-tia kunveno.

Bedaŭrinde ni povas pagi nenion (eble malmulton) por tia organiza&partoprena agado.

Tiam mi/vi povas anonci la kunsidon de AVE-anoj.

Koran dankon, amike Manfred

= =

2016-02 Lerni kaj Ghui en Grezijono - kaj partopreni Eventojn tutmonde

Atentu: en la lasta mesaĝon mi troigis: per troa „s“.

gresillon.org - la fama franca Esperanto-Kasteleto proksime de la Loire kaj Loir invitas.

<http://gresillon.org/agendo>

kaj ĝenerale: [Eventoj.hu/kalendaro.htm](http://Eventoj.hu/kalendaro.htm) - jen pli kompleta kalendaro de la nia movado.